

V-19563
Esperanto


3

(1967) N. 23

LA

SKOLTA MONDO

OFICIALA ORGANO DE LA SKOLTA ESPERANTISTA LIGO
· FONDITA EN 1918 ·



Fondinto: "Avoto", Kunfondinto: J. W. Leslie.
Honoraj Prezidantoj: "Avoto". Norman Booth, Kolonelo
D. H. Davis. L. J. Van Gulck.

Prezidanto: DOUGLAS MURPHY, 7, Constable Road Ipswich, Anglujo.

Sekretario: J. K. HAMMER, Taxustraat 7, Zaandam, Nederlando.

Kasisto: DAVID H. WITHEY, 21 Brookfield Avenue, Waterloo, Liverpool 22, Anglujo.

Cefredaktoro: PASTRO H. A. ROSBACH, Nergt. 37c, Kristiansund N. Norvegujo.



Karaĵ amikoj!

Lasu min tuj diri, ke mi hontis, kiam mi vidis la numeron de LSM kiun mi elsendis lastfoje. Kaj mi kredas, ke estas klarigo nun ĝenerala postulo. Iuj el vi miris, vidante la nigran makulon sur paĝo 214, aliaj trovis malplanan lokon tie. La paĝo 213 ne estis bela, eĉ malfacile legebla. Kaj ankaŭ en aliaj manieroj la numero estis malbela.

Nu: Oni uzis tute novan maŝinon por fari elektronajn ŝablonojn. Montriĝis, ke la lumofonto en tiu maŝino estis ne nur forta, sed tro forta, tiel ke la bildo, tondita el la kanada gazeto Lumo, iĝis nur nigra. Rezulto: En kelkaj el la gazetoj la nigra makulo estis, poste ni forigis ĝin. Same la lumfonto bildigis ankaŭ la literojn sur la malantaŭa flanko de la papero, kiun vi povas facile vidiar la bildo paĝo 218.

Al la skribado estas uzita tro malnova maŝino, kies forto estis tia, ke la literoj tranĉis tra ne nur unu parto de la stencilo, sed ankaŭ tra kovrilo kaj nova paĝo - pro la ne sufiĉe longa vagono de la maŝino oni devis duoble meti la stencilojn en la maŝinon. Kaj fine rompiĝis unu stencilo, kaj tiel la paĝo 213 iĝis kia ĝi estas.

Mi do petas pardonon.

Nun mi esperas, ke tiu ĉi numero fariĝos rekompenco. Se ne mi devas denove uzi la bildon kiun mi metis ĉe la pripapero de mia libro.

La pasinta numero estis pli dika ol tiu ĉi. I.a. estis en ĝi 16 paĝoj el la libro "Kien". Tiu ĉi numero havas entute 12 paĝojn. Sed ni anstataŭe enmetis pli da teksto sur ĉiu paĝo, kaj la enhavo estas preskaŭ kiel 24-paĝa numero. La libro okupos estonte 4 paĝojn, kiuj havos siajn proprajn numerojn. Vi povos ilin elpreni, se vi deziras kolekti la libron.

La aŭtero donis sian permeson al la traduko kaj eldono.

Li mem - siatempe - estis skolto, kaj en la knabaj jaroj verkis ne nur tiun ĉi, sed ankaŭ alian libron. Ankaŭ en postaj jaroj li verkis porknabajn librojn.

Via
Hans Amund.



OFICIALA ORGANO DE LA SKOLTA ESPERANTISTA LIGO

Volume III, n-ro 23.

kvara jarkvarono 1967.

LETEROJ

Gis ni iĝos vere fortaj, la leteroj verŝajne restos nia plej forta armilo. Per niaj leteroj ni povas atingi rezultojn.

Tial la rubriko "korespondu" estas unu el la plej gravaj de nia revuo. Tamen ĝi ne estas en tiu ĉi numero. Vi certe komprenas kial. Neniu petis koresponĉon!

Imagu, se vi povus montri al viaj skoltaj kamaradoj ekz.

poŝtmarkojn, skoltajn insignojn k.s., kiujn vi ricevis pere de Esperanto. Ili tuj vidus la utilon. Aŭ vi fierus per mondfrateca, interpretista aŭ alia insigno gajnita pere de nia lingvo.

Sammaniere leteroj estas utilaj al nia revuo. Kritiko, konsiloj, materialo.

Kaj fine, sed ne malplej, leteroj estas bona pafilo, kiam vi petas turismajn broŝurojn kaj alian materialon por viaj studoj - lingvaj aŭ geografiaj, privataj aŭ lernejoj.



BRONZA LUPO

AL BELGUJO.

En 1935 nia Fondinto, Lord Baden-Powell de Gilwell, iniciatis specialan honorinsignon, kiun la Monda Komitato aljuĝu por agnoski elstarajn servojn al la Internacia Skoltismo. Kun plezuro ni sciigas, ke en la 21-a Monda Skolt-konferenco lastan Aŭguston en Seattle, Washington, Usono, tiu malofta honorigo, la Bronza Lupo, estis ricevita de s-ro Philip Tossijn, belga Komisararo por eksterlando. Menciinde estas, ke s-ro Tossijn fariĝas la unua belgo tiamaniere dekoraciita, kaj ĉar li estas bona amiko de SEL, mi sendis gratulojn en nia nomo. Responde mi havis ĝentilan leteron, ".....mi estas granda subtenanto de ĉiuj viaj strebadoj favore al Esperanto interne de nia mondmovado, kaj se estus io, kion mi povus fari por helpi al vi, ne hezitu peti min. Bedaŭrinde, mi finis mian oficperiodon sesjaran en la Mondkomitato en Seattle, sed ĉar mi estas ano de la grava Reorganiza Komitato.....mi opinias, ke ne estos tro malfacile helpi vin kiam taŭgos..."

Certe SEL alte taksas ĉi tiun apogon fare de grava internacia skoltestro, ĉu ne?

F. Douglas Murphy.
Prezidanto.

LA CELO DE SKOLTISMO

La aŭtoro de la suba artikolo estas fama finna skoltestro, Ilmari Vainio. La tradukon de ĝi faris Seppo Tella.

I
L
M
A
R
I

V
A
I
N
I
O

"Prenu la knabon kaj virigu lin". Per ĉi tiuj vortoj lordo Roberto Baden-Powell of Gilwell, fondinto de skolta movado, difinis la sencon de skoltismo.

La skoltismo celas apogi kaj evoluigi al ĝusta direkto la sanan, abundan vivemon kaj superfluan energion de la knabo, lian naturdevenan kavalirecon kaj lian kulton de bravuloj, lian aventuremon kaj lian sopiron al vivo kaj naturo. La skoltismo, t.e. la intelekta kaj korpa evoluo same kiel la humana agado, tiel kreas sanajn, liberajn, memstarajn kaj pripensemajn civitanojn kiel ankaŭ bonajn homojn.

La idealo de skolto estas agema viro, nobla vagvojaĝanto en arbaregoj, luma kunhomo.

Por iĝi tia, li ŝtaligas siajn sencojn, ekzercadas unuahelpojn kaj flegadon, antaŭkalkulojn de distancoj kaj mallongaj periodoj, interesigas pri sinorientado, sinookupas je morsado, je nodoj kaj splisoj kaj kroĉoj. - Vagvojaĝo en la naturo kaj tendumo dum neĝo kaj varmeĝo apartenas rekte al skolta agado.

Skolto scias, ke por kapabli agi efike kiam neceza, li devas



li kuregis post la kamarado tra la pordego.

Voĉo vokis ion malantaŭ ili. La antikvaĵisto ordonis, ke ili haltu. Kiam ili ne obeis, li sekvis je miriga rapideco.

Håkon ne volis riski persekuton laŭ la strato, tamen li pentis, kiam li venis al la korto. Ĝi estis kvazaŭ kaptilo. Nur unu pordego kondukis al ĝi, tiu tra kiu ili venis, kaj ili ne povis rekuri sen trafi la persekutanton. Longa aŭtomobilejo baris inter ili kaj la alia korto apude. Jumbo hezitis, sed Håkon pli rapide pensis.

"En la kuirreĵojn irejon tie! La pordo al la kelo estas malferma."

Ĉio okazis fulrrapide. La antikvaĵisto venis sufiĉe frue por vidi Jumbon malaperi laŭ la keloŝtuparo. "Nun mi kaptis lin", li murmuris. Li ankoraŭ ne komprenis, ke li persekutis du.

Håkon tute nature prenis la gvidon. Li estis la plej aĝa, kaj la plej aŭtoritata, kaj li sciis, kiom tiu persekuto signifas. Jumbo sekvis laŭ liaj signoj sen heziti. En si li sentis haoson, kies kaŭzon li ne havis tempon esplori.

Ili kuris laŭ la longa, malluma kelo sen alia penso ol eviti la persekutanton. Iliaj paŝoj sonis laŭte inter la muroj. Ili alvenis al la ŝtuparo ĉe la alia koridorofino kaj ascendis ĝin per kelkaj saltoj.

La pordo estis ŝlosita!

La knaboj restis lamigitaj. Ili nur fiksrigardis unu la alian, sed iliaj rigardoj pli ol vortoj atestis pri la sento - ili estis kaptitaj. Vice kaj kune ili provis malfermi la pordon, sed vane.

"Kie la oldulo estas?" demandis Håkon subite.

Ili ambaŭ aŭskultis. Eĉ ne sonon ili povis aŭdi. Ĉu la ĉasisto rezignis?

"Ni reiru. Estas nia sela ŝanco."

Ambaŭ sciis, ke tio estas riskego, kiam ili rapidis reen. Sed kion fari? Ili estis ĉasitaj en angulon, el kiu decis eskapi.

"Kion, se li kaŝobservas nin?" plorsingultis Jumbo.

Håkon eĉ ne momenton hezitis.

"Ni devos lin pugnofaligi", li diris mallonge, kaj lia voĉtono indikis, ke tion li diris tute serioze.

Sed ne okazis interbatalo. La maljuna antikvaĵisto agis strategie. Sciante, ke la alia elirejo jam estas ŝlosita, li ne ĉasadis la fuĝintojn, sed ankaŭ ŝlosis la unuan pordon malantaŭ ili. Nun li nur atendis la policon.

Subite Jumbo ne povis porti pli. La larvoj torentis laŭ lia vizaĝo, kaj li fikse kaptis la amikon ĉe la ŝultroj:

"Kio, kio - kial oni ĉasas nin tiel? Kial la polico venos? Mi faris nenion malpermesitan - ne, ne, mi ne faris. Mi volas hejmen. Panjo, mi volas hejmen. Kion signifas tio, Håkon?"

Sen atendi respondon li komencis kuri tien - reen, kiel kuniklo, kiu serĉas kaŝstruon. Kaj ĉiam la penso turmentis lin: La polico baldaŭ venos. Ili volas min. La polico...

Subite li haltis. Ĉu paŝojn li aŭdas? Ĉu ili venas jam nun? - Ne, estis imago, nur. Sed kion Håkon faradas?

"Ĉesigu la ploradon, suĉinfano. Kaj helpu min. La tenilo

de la ŝlosa de tiu kelobudo estas malbone fiksita. Se ni povas eltiri ĝin, ni ankoraŭ povas saviĝi. Ne, lasu min mem fari tion, netaŭgulo."

La insultoj iom helpis al Jumbo. Li ĉesis plori, kaj nur singultis. Kaj subite li ekkomprenis, ke li, Erik Ask, la heroo de miloj revitaj aventuroj, nun kondukis tiel mizere senhelpa. Kiom ofte li sur la sofo hejme revis pri iu tia situacio, kaj kiel lude kaj simple li ĉiam majstris la malfacilaĵojn? Kaj nun....

Ofte Jumbo ja suspektis, ke la miraklulo, kiun li image konstruis, ne ekzistas en la vero, sed li ĉiam forŝovis la pensojn. Nur nun li honeste konfesis, ke li estas tute kiel aliaj homoj, nu, eble iom pli malforta.

Jen li kuris sencele kaj ploris infanece, li, kiu devis konduki - jes, kiel Håkon dummomente.

La amiko uzis sian tranĉilon por eligi la tenilon. Ĝi pli kaj pli malfiksiĝis, sed ankoraŭ restis en la ligno. La knabo laboris kun kreskanta despero. Estis ne malfacile vidi, ke ankaŭ li timis, sed samtempe estis en liaj okuloj stranga brilo, vibranta ĝojo pro la travivaĵo. Spite al la timo Håkon iel ĝuis la situacion, kaj subite la alia ekkomprenis kial li mem neniam fariĝos la ĉion venkanta heroo, kiun li kreis en la revoj. Li ne povis travivi romanon, ĉar la aventuro ne loĝas en li.

"Mi aŭdas voĉojn," flustris Jumbo. "Ni neniam sukcesos." Håkon prenis per la manoj la tenilon, kaj tiregis. Vane. Nova subita tirego. Jen li malantaŭenfalis, kaj la tenilo falis tintanta al la planko kune kun la ŝlosa.

"Estas du, ili ĵus interparolis", aŭdiĝis la voĉo de la antikvaĵisto. "Ili neniel povas eskapi."

Pezaĵ botoj tretis laŭ la keloŝtuparo.

TEMAS PRI SEKUNDOJ.

"Ĉi tien! Rapidu malfermi la fenestron!" flustris Håkon peze. Mem li fulmrapide kliniĝis, prenis la ŝloson kaj la tenilon kaj venis post Jumbo en la budon. Tiam li altiris la malfortikan budopordon tiel bone kiel eble.

La malvasta kelofenestro sin turnis al la strato, proksimume decimentron super la trotuaro. Jumbo sin streĉis super la koaksujon por malfermi la fenestron, sed lia mano tremis tiel, ke li devis pugnigi ĝin por povi kontroli la nervojn. Griza nebulo naĝis antaŭ la okuloj.

Kun nebonvola eldiro Håkon puŝis lin apuden. La fenestro estis fikse fermita, kaj knaris dum li perforte puŝis ĝin malferma. La sono tranĉis tra ili. Nun oni certe trovos ilin. Ili haltis la spiron por aŭskulti.

Evidente estis du policistoj, kaj ili ne trorapidis - ankoraŭ. Ili certe kredis, ke la persekutitoj sidas senkuragaĵ sur la fora ŝtuparo, atendantaj. Trankvilaj kaj memfidaj ili paŝis laŭ la kela koridoro, kaj ĉiu paŝo sonis kiel juĝotaga tondro al la knaboj.

Jumbo preskaŭ ekkriis, kiam ili proksimiĝis al la budo. Ĉu ili ekvidos, ke la ŝlosa mankas? Tiukaze ili estas perditaj. Ili ne povis fari eĉ moveton nun, aŭ fari ion ajn. Nur plej eta movo malkaŝus ilin.

La veplenaĵ sekundoj certe staros ĉizitaj en la memoro

li kuregis post la kamarado tra la pordego.

Voĉo vokis ion malantaŭ ili. La antikvaĵisto ordonis, ke ili haltu. Kiam ili ne obeis, li sekvis je miriga rapideco.

Hákon ne volis riski persekuton laŭ la strato, tamen li pentis, kiam li venis al la korto. Ĝi estis kvazaŭ kaŭtilo. Nur unu pordego kondukis al ĝi, tiu tra kiu ili venis, kaj ili ne povis rekuri sen trafi la persekutanton. Longa aŭtomobilejo baris inter ili kaj la alia korto apude. Jumbo hezitis, sed Hákon pli rapide pensis.

"En la kufrejoenirejon tie! La pordo al la kelo estas malferma."

Ĉio okazis fullrapide. La antikvaĵisto venis sufiĉe frue por vidi Jumbon malaperi laŭ la keloŝtuparo. "Nun mi kaptis lin", li murmuris. Li ankoraŭ ne komprenis, ke li persekutis du.

Hákon tute nature prenis la gvidon. Li estis la plej aĝa, kaj la plej aŭtoritata, kaj li sciis, kiom tiu persekuto signifas. Jumbo sekvis laŭ liaj signoj sen heziti. En si li sentis haŭson, kies kaŭzon li ne havis tempon esplori.

Ili kuris laŭ la longa, malluma kelo sen alia penso ol eviti la persekutanton. Iliaj paŝoj sonis laŭte inter la muroj. Ili alvenis al la ŝtuparo ĉe la alia koridorofino kaj ascendis ĝin per kelkaj saltoj.

La pordo estis ŝlosita!

La knaboj restis lamigitaj. Ili nur fiksigardis unu la alian, sed iliaj rigardoj pli ol vortoj atestis pri la sento - ili estis kaptitaj. Vice kaj kune ili provis malfermi la pordon, sed vane.

"Kie la oldulo estas?" demandis Hákon subite.

Ili ambaŭ aŭskultis. Eĉ ne sonon ili povis aŭdi. Ĉu la ĉasisto rezignis?

"Ni reiru. Estas nia sola ŝanco."

Ambaŭ sciis, ke tio estas riskego, kiam ili rapidis reen. Sed kion fari? Ili estis ĉasitaj en angulon, el kiu decis eskapi.

"Kion, se li kaŝobservas nin?" plorsingultis Jumbo.

Hákon eĉ ne momenton hezitis.

"Ni devos lin pugnofaligi", li diris mallonge, kaj lia voĉtono indikis, ke tion li diris tute serioze.

Sed ne okazis interbatalo. La maljuna antikvaĵisto agis strategie. Sciante, ke la alia elirejo jam estas ŝlosita, li ne ĉasadis la fuĝintojn, sed ankaŭ ŝlosis la unuan pordon malantaŭ ili. Nun li nur atendis la policon.

Subite Jumbo ne povis porti pli. La larvoj torrentis laŭ lia vizaĝo, kaj li fikse kaptis la amikon ĉe la ŝultroj:

"Kio, kio - kial oni ĉasas nin tiel? Kial la polico venos? Mi faris nenion malpermesitan - ne, ne, mi ne faris. Mi volas hejmen. Panjo, mi volas hejmen. Kion signifas tio, Hákon?"

Sen atendi respondon li komencis kuri tien - reen, kiel kuniklo, kiu serĉas kaŝstruon. Kaj ĉiam la penso turmentis lin: La polico baldaŭ venos. Ili volas min. La polico...

Subite li haltis. Ĉu paŝojn li aŭdas? Ĉu ili venas jam nun? - Ne, estis imago, nur. Sed kion Hákon faradas?

"Ĉesigu la ploradon, suĉinfano. Kaj helpu min. La tenilo

de la ŝloso de tiu kelobudo estas malbone fiksita. Se ni povas eltiri ĝin, ni ankoraŭ povas saviĝi. Ne, lasu min mem fari tion, netaŭgulo."

La insultoj iom helpis al Jumbo. Li ĉesis plori, kaj nur singultis. Kaj subite li ekkomprenis, ke li, Erik Ask, la heroo de miloj revitaj aventuroj, nun kondutis tiel mizere senhelpa. Kiom ofte li sur la sofo hejme revis pri iu tia situacio, kaj kiel lude kaj simple li ĉiam majstris la malfacilaĵojn? Kaj nun....

Ofte Jumbo ja suspektis, ke la miraklulo, kiun li image konstruis, ne ekzistas en la vero, sed li ĉiam forŝovis la pensojn. Nur nun li honeste konfesis, ke li estas tute kiel aliaj homoj, nu, eble iom pli malforta.

Jen li kuris sencele kaj ploris infanece, li, kiu devis konduki - jes, kiel Håkon dummomente.

La amiko uzis sian tranĉilon por eligi la tenilon. Ĝi pli kaj pli malfiksiĝis, sed ankoraŭ restis en la ligno. La knabo laboris kun kreskanta despero. Estis ne malfacile vidi, ke ankaŭ li timis, sed samtempe estis en liaj okuloj stranga brilo, vibranta ĝojo pro la travivaĵo. Spite al la timo Håkon iel ĝuis la situacion, kaj subite la alia ekkomprenis kial li mem neniam fariĝos la ĉion venkanta heroo, kiun li kreis en la revoj. Li ne povis travivi romanon, ĉar la aventuro ne loĝas en li.

"Mi aŭdas voĉojn," flustris Jumbo. "Ni neniam sukcesos."

Håkon prenis per la manoj la tenilon, kaj tiregis. Vane. Nova subita tirego. Jen li malantaŭenfalis, kaj la tenilo falis tintanta al la planko kune kun la ŝloso.

"Estas du, ili ĵus interparolis", aŭdiĝis la voĉo de la antikvaĵisto. "Ili neniel povas eskapi."

Pezaj botoj tretis laŭ la keloŝtuparo.

TEMAS PRI SEKUNDOJ.

"Ĉi tien! Rapidu malfermi la fenestron!" flustris Håkon peze. Mem li fulmrapide kliniĝis, prenis la ŝloson kaj la tenilon kaj venis post Jumbo en la budon. Tiam li altiris la malfortikan budopordon tiel bone kiel eble.

La malvasta kelofenestro sin turnis al la strato, proksimume decimentron super la trotuaro. Jumbo sin streĉis super la koaksujon por malfermi la fenestron, sed lia mano tremis tiel, ke li devis pugnigi ĝin por povi kontroli la nervojn. Griza nebulo naĝis antaŭ la okuloj.

Kun nebonvola eldiro Håkon puŝis lin apuden. La fenestro estis fikse fermita, kaj knaris dum li perforte puŝis ĝin malferma. La sono tranĉis tra ili. Nun oni certe trovos ilin. Ili haltis la spiron por aŭskulti.

Evidente estis du policistoj, kaj ili ne trorapidis - ankoraŭ. Ili certe kredis, ke la persekutitoj sidas senkuragaĵaj sur la fora ŝtuparo, atendantaj. Trankvilaj kaj memfidaj ili paŝis laŭ la kela koridoro, kaj ĉiu paŝo sonis kiel juĝotaga tondro al la knaboj.

Jumbo preskaŭ ekkriis, kiam ili proksimiĝis al la budo. Ĉu ili ekvidos, ke la ŝloso mankas? Tiukaze ili estas perditaj. Ili ne povis fari eĉ moveton nun, aŭ fari ion ajn. Nur plej eta movo malkaŝus ilin.

La veplenaĵ sekundoj certe staros ĉizitaj en la memoro

de la knaboj. Jen la policistoj estas ekstere. Ĉu ili haltas? Ne, ili pasas. Kaj jen la ŝanco.

Kiel kato Håkon estis sur la koaksoj. Ili knaris sub li. Jen li ekpremas sin tra la fenestro. La pluvo vipis lin en la vizaĝo. Kelkaj fortaj korpomovoj, kaj li estis sur la trotoaro.

"Rapidu, knabo!"

Jumbo ne bezonis la admonon. Ekstere li aŭdis minacantajn voĉojn, evidente la policistoj nun pli ekrapidis. Li glitis iom sur la koaksoj, sed ĵetis sin antaŭen, kaj komencis sin eligi. Samtempe vokis laŭta voĉo: "Hej, pordo malfermita." Kaj jen granda policisto rapidis en la budon.

Sento de tuta lamigo kaptis Jumbon. Estis kiel en inkuba sonĝo, kiam grandaj sangohundoj persekutas, kaj oni ne povas movi. Li volis kriei, sed la lango rifuzis obei. Tiam Håkon kaptis lin kaj forte tiris lin tra la fenestro, tuj antaŭ la rapidanta policisto.

En la pluvego estis nur unu sola iranto surstrate. Li haltis tute sen kompreni ion ajn, kiam li vidis la strangan okazaĵon ĉe la kelofenestro dudek metrojn antaŭe. Jen devas io malbona okazi. Suspekto li ekkuris.

Sed la fato ne donis al tiu tiajn kurtalentojn, kiajn li bezonus por gajni la vetkuron. Håkon kuris kiel cervo, kaj Jumbo nun regajnis siajn fortojn. Ĉirkaŭ la angulo, super barilo, kie ili sin tranĉis sur pikila drato, en novan straton kaj laŭ ĉiaj zigzagvojoj por misgvidi persekutantojn.

Kaj ili ja eskapis, sed lacegaj ili estis, kiam ili fine haltis ekster la loĝejo de Håkon, kiu invitis la kamaradon en sian kavernon. Jumbo ekmalŝatis kelojn, kaj unue ne volis. Sed li komprenis, ke ili nun bezonas preparoli la aferojn. Ili povos kiam ajn esti kaptitaj por esploro, kaj tiam decos respondi saĝe.

Preskaŭ dum horo ili interparolis en la "kavernon". Jumbo komencis. Li estas pli pala ol ordinare, sed lia voĉo estis sufiĉe trankvila.

"Håkon, kion signifas ĉio ĉi tio?"

Estis ja ampleksa demando, kaj la kamarado unue pripensis la aferon.

"Mi devas konfesi, ke mi mensogetis al vi", lifine diris.

"Mi ne heredis la ponardon de iu onklo. Tion mi diris nur por impresi al vi."

"Vi opinias...?"

"Aŭskultu, kaj ne interrompu! - Nu, por esti honesta, mi ricevis ĝin antaŭ monato de iu, al kiu mi faris ian servon. "Jen la sola valorajo kiun mi posedis", li diris, "kaj ĝin vi havu kiel danko". Komprenoble mi protestis kaj rifuzis akcepti, sed li insistis. Nun mi bone komprenas lian donacemon. Li ŝtelis la ponardon! sed li ne povis vendi ĝin, kaj ne plu kuraĝis teni ĝin."

Jumbo ekspiregis. La amiko iris al la bretaro kaj prenis malnovan gazeton. Ĝi estis malfermita sur la tria paĝo. Li montris al malgranda noto:

Stelo ĉe fama kolektanto.

Doktoro Sparre, kiu havas unu el la plej grandaj kolektoj de valoraj antikvaĵoj, ĉinokte havis

viziton de Ŝtelisto. La nebonvena gasto evidente envenis tra la ĝardeno kaj per malferma fenestro Strange li nur kunprenis malnovan, raran ponardon kiun la doktoro tre ŝatas kaj deziras rehavi. La polico estas informita.

"Nu bone", Håkon diris dramatike, "ni povas konkludi, ke tiun ponardon vi provis hodiaŭ vendi. Espereble ni neniam plu aŭdos ion ajn pri ĝi.

Jumbo miregis.

Vi ne povas diri, ke vi petis min preni tiun riskon, dum vi kredis, ke la ponardo estis Ŝtelita?"

"Ĉu vi frenezas! Mi scias nenion antaŭ ĉi antaŭtagmezo. Kiel vi scias, mi estis eksterurbe ĉe parenco, kaj ĉe li mi hazarde vidis tiun noton, kiam mi bezonis paperon por enpaki ion. Kaj tiam mi rapidegis hejmen kaj jen al la antikvaĵisto. Mi venis tuj post vi, kaj vidante la oldulon iri en la malantaŭan ĉambron, mi komprenis, ke li volas telefoni al la polico. Vere lastmomente mi avertis vin."

Ili ambaŭ silentis. Jumbo provis ordigi siajn pensojn. - Laŭ lia kompreno la amiko donis kontentigan klarigon. Kaj do la situacio nun estis, ke li, Erik Ask, provis veni Ŝtelitan ponardon, pro kio ĉiu kredos, ke li estas la Ŝtelisto. Ek de nun li neniam estos sekura. La polico serĉos lin ĉie. Jes - nun li vere sukcesis esti ĵetita en tiajn sensaciojn, pri kiuj li imagis, ke li spiras.

Håkon interrompis liajn maltrankvilajn pensojn.

"Por diri mian opinion, ni bone sukcesis", li diris kun certa fiero. "Ne ĉiutage la policon iu tiel misgvidas."

"Ne estu tiel certa, ke ni evitis ilin!" La voĉo de Jumbo tremblis. "Ĉi tio estas nura plilongigo de tempo. Pli-malpli frue ni estos kaptitaj, kaj tiam la demando estos, ĉu iu kredos je nia klarigo."

"Kial esti kaptitaj? La polico ne konas nin."

"Ne, sed ekster la antikvaĵisto du policanoj vidis nin, kaj tiel ili havas bonan impreson de ni."

"Vi certe eraras. Neniu el ili vidis min bone, kaj rilate al vi la policistoj nur ekvidis viajn ŝuplandojn antaŭ ol vi malaperis tra la fenestro. La oldulo en la butikoj estas miopa kiel strigo, lin ni ne bezonas timi. Krome la pluvo kaj via neĝentileco helpis."

"Mi - mi ne tute komprenas..."

"Pro la pluvo vi portis vastan pluvomantelon kun la kolumo suprenmetita, kaj la ĉapo estis prenita ĝis preskaŭ la okuloj. Tial tute ne estos facile priskribi vin."

"Sed mi ja deprenis..."

"Ne, tion vi ne faris. Via tasko kiel vendisto estis tiel fremda al vi, ke vi pro ĝentileco forgesis ĝentilecon. Eĉ en la momento, kiam vi petis la oldulon aĉeti la ponardon, vi tenis la ĉapon surkape."

Jumbo ruĝiĝis. Ke li tiel malĝentilis! Tamen la vortoj de Håkon forprenis monton de sur lia koro. La danĝero tamen ne estis tiel granda kiel li imagis. Sed ek de nun li vere gardos sin ne atingi al similaj travivaĵoj! Li ne scias, ke la aventuroj ne facile haltas, kiam ili jam komenciĝis.

de la knaboj. Jen la policistoj estas ekstere. Ĉu ili haltas? Ne, ili pasas. Kaj jen la ŝanco.

Kiel kato Håkon estis sur la koaksoj. Ili knaris sub li. Jen li ekpremas sin tra la fenestro. La pluvo vipis lin en la vizaĝo. Kelkaj fortaj korpomovoj, kaj li estis sur la trotuaro.

"Rapidu, knabo!"

Jumbo ne bezonis la admonon. Ekstere li aŭdis minacantajn voĉojn, evidente la policistoj nun pli ekrapidis. Li glitis iom sur la koaksoj, sed ĵetis sin antaŭen, kaj komencis sin eligi. Samtempe vokis laŭta voĉo: "Hej, pordo malfermita." Kaj jen granda policisto rapidis en la budon.

Sento de tuta lamigo kaptis Jumbon. Estis kiel en inkuba sonĝo, kiam grandaj sangohundoj persekutas, kaj oni ne povas movi. Li volis krii, sed la lango rifuzis obei. Tiam Håkon kaptis lin kaj forte tiris lin tra la fenestro, tuj antaŭ la rapidanta policisto.

En la pluvego estis nur unu sola iranto surstrate. Li haltis tute sen kompreni ion ajn, kiam li vidis la strangan okazaĵon ĉe la kelofenestro dudek metrojn antaŭe. Jen devas io malbona okazi. Suspekto li ekkuris.

Sed la fato ne donis al tiu tiajn kurtalentojn, kiajn li bezonus por gajni la vetkuron. Håkon kuris kiel cervo, kaj Jumbo nun regajnis siajn fortojn. Ĉirkaŭ la angulo, super barilo, kie ili sin tranĉis sur pikila drato, en novan straton kaj laŭ ĉiaj zigzagvojoj por misgvidi persekutantojn.

Kaj ili ja eskapis, sed lacegaj ili estis, kiam ili fine haltis ekster la loĝejo de Håkon, kiu invitis la kamaradon en sian kavernon. Jumbo ekmalŝatis kelojn, kaj unue ne volis. Sed li komprenis, ke ili nun bezonas preparoli la aferojn. Ili povos kiam ajn esti kaptitaj por esploro, kaj tiam decos respondi saĝe.

Preskaŭ dum horo ili interparolis en la "kaverno". Jumbo komencis. Li estas pli pala ol ordinare, sed lia voĉo estis sufiĉe trankvila.

"Håkon, kion signifas ĉio ĉi tio?"

Estis ja ampleksa demando, kaj la kamarado unue pripensis la aferon.

"Mi devas konfesi, ke mi mensogetis al vi", lifine diris.

"Mi ne heredis la ponardon de iu onklo. Tion mi diris nur por impresi al vi."

"Vi opinias...?"

"Aŭskultu, kaj ne interrompu! - Nu, por esti honesta, mi ricevis ĝin antaŭ monato de iu, al kiu mi faris ian servon. "Jen la sola valorajo kiun mi posedis", li diris, "kaj ĝin vi havu kiel danko". Komprenoble mi protestis kaj rifuzis akcepti, sed li insistis. Nun mi bone komprenas lian donacemon. Li ŝtelis la ponardon! sed li ne povis vendi ĝin, kaj ne plu kuraĝis teni ĝin."

Jumbo ekspiregis. La amiko iris al la bretaro kaj prenis malnovan gazeton. Ĝi estis malfermita sur la tria paĝo. Li montris al malgranda noto:

Ŝtelo ĉe fama kolektanto.

Doktoro Sparre, kiu havas unu el la plej grandaj kolektoj de valoraj antikvaĵoj, ĉinokte havis

viziton de Ŝtelisto. La nebonvena gasto evidente envenis tra la ĝardeno kaj per malferma fenestro Strange li nur kunprenis malnovan, raran ponardon kiun la doktoro tre ŝatgas kaj deziras rehavi. La polico estas informita.

"Nu bone", Håkon diris dramatike, "ni povas konkludi, ke tiun ponardon vi provis hodiaŭ vendi. Espereble ni neniam plu aŭdos ion ajn pri ĝi.

Jumbo miregis.

Vi ne povas diri, ke vi petis min preni tiun riskon, dum vi kredis, ke la ponardo estis Ŝtelita?"

"Ĉu vi frenezas! Mi sciis nenion antaŭ ĉi antaŭtagmezo. Kiel vi scias, mi estis eksterube ĉe parenco, kaj ĉe li mi hazarde vidis tiun noton, kiam mi bezonis paperon por enpaki ion. Kaj tiam mi rapidegis hejmen kaj jen al la antikvaĵisto. Mi venis tuj post vi, kaj vidante la oldulon iri en la malantaŭan ĉambron, mi komprenis, ke li volas telefoni al la polico. Vere lastmomente mi avertis vin."

Ili ambaŭ silentis. Jumbo provis ordigi siajn pensojn. - Laŭ lia kompreno la amiko donis kontentigan klarigon. Kaj do la situacio nun estis, ke li, Erik Ask, provis vendi Ŝtelitan ponardon, pro kio ĉiu kredos, ke li estas la Ŝtelisto. Ek de nun li neniam estos sekura. La polico serĉos lin ĉie. Jes - nun li vere sukcesis esti ĵetita en tiajn sensaciojn, pri kiuj li imagis, ke li sopiras.

Håkon interrompis liajn maltrankvilajn pensojn.

"Por diri mian opinion, ni bone sukcesis", li diris kun certa fiero. "Ne ĉiutage la policon iu tiel misgvidas."

"Ne estu tiel certa, ke ni evitis ilin!" La voĉo de Jumbo tremblis. "Ĉi tio estas nura plilongigo de tempo. Pli-malpli frue ni estos kaptitaj, kaj tiam la demando estos, ĉu iu kredos je nia klarigo."

"Kial esti kaptitaj? La polico ne konas nin."

"Ne, sed ekster la antikvaĵisto du policanoj vidis nin, kaj tiel ili havas bonan impreson de ni."

"Vi certe eraras. Neniu el ili vidis min bone, kaj rilate al vi la policistoj nur ekvidis viajn ŝuplandojn antaŭ ol vi malaperis tra la fenestro. La oldulo en la butikoj estas miopa kiel strigo, lin ni ne bezonas timi. Krome la pluvo kaj via neĝentileco helpis."

"Mi - mi ne tute komprenas..."

"Pro la pluvo vi portis vastan pluvomantelon kun la kolumo suprenmetita, kaj la ĉapo estis prenita ĝis preskaŭ la okuloj. Tial tute ne estos facile priskribi vin."

"Sed mi ja deprenis..."

"Ne, tion vi ne faris. Via tasko kiel vendisto estis tiel fremda al vi, ke vi pro ĝeniteco forgesis ĝentilecon. Eĉ en la momento, kiam vi petis la oldulon aĉeti la ponardon, vi tenis la ĉapon surkape."

Jumbo ruĝiĝis. Ke li tiel malĝentilis! Tamen la vortoj de Håkon forprenis monton de sur lia koro. La danĝero tamen ne estis tiel granda kiel li imagis. Sed ek de nun li vere gardos sin ne atingi al similaj travivaĵoj! Li ne sciis, ke la aventurcjo ne facile haltas, kiam ili jam komenciĝis.

trejni sin antaŭe. Per ekzercoj li volas fortiĝi; tute same kiel bona naĝisto ne timemas la malvarmon de akvo kiel lia malpli ofte naĝanta kunulo.

Bona skolto sin helpas ĉie. Senhelpe li pioniras en la arbaregoj; la nocio "skoltismo" ja enhavas tute esence la laboron de pioniroj kaj esplorvojaĝistoj: Li estas preta klarigi ĉiujn naturfenomenojn: li atentus pri la suno, luno kaj steloj, pri vento, roso kaj pri nebulo. Li scias konstrui dometojn el picebranĉej kaj kontraŭventajn ŝirmojn, li kapablas fari sian fajron malgraŭ ŝtormoj kaj nesekeco, li eĉ kuiras en malavantaĝas cirkonstancoj. Finna knabskolto volas ankaŭ heredi la nacian necedeman karakteron, kiu iam inspiris la ĉasistajn prapatrojn. Finnoj ja kutimiĝis logi kaj vivi en granda naturo, kaj havas longajn tradiciojn pri ĉasista vivo.

Sed skolto volas ankaŭ esti posteulo de iamaj kavaliroj. Laŭ ilia kutimo li volas, laŭ sia povo, esti sincera kaj neriproĉebla kaj ĉiam preta helpi siajn proksimulojn. Tia li provas esti hejme, en lernejo kaj ĉiam en sia vivo. Li volas malegiste plenumi siajn devojn. Li lernas distingi inter malbona kaj bona por ne blinde obei al ordonoj aŭ detalaj instrukcioj.


Skolta movado ne sole estas rimedo, per kiu oni donas al knaboj okupon dum libertempo. Ne nur temas pri iu nova ludo aŭ formo de subĉiela sporto; la celo de skoltismo estas pli grava. Kompreneble, amuzaĵo estas nur vojo, ne celo.

Skoltismo signifas grandan evoluigon. La afero estas tiel larĝa, ke oni neniam povos tion elĉerpi. Ĝi inkluzivas tiajn noblajn ŝatokupojn kiel servo al siaj kunhomoj, tolerema kaj sincera serĉado de vero, sobereco, protekto de bestoj, sinedukado, sporto, hejma regiona esploro, intereso pri leteraturo kaj arto.

Skolta movado ne tute similas al sporta movado, ankoraŭ malpli al milita organizo. Oni ne misprenu libervolan skoltan disciplinon por deviga armea disciplino. Certe la bonaj skoltoj fariĝos bonaj soldatoj, sed ankaŭ estas intereso pri pacismo en skoltaj rondoj, kio estas cetere pli remarkinda, ĉar ĉi tia tendenco manifestiĝas en tiuj anglaj rondoj, kiuj originale estis relative militaristaj. Ĉar la bazo de skoltismo kuŝas sur la fakto, ke la honoron de la skolto oni povas fidi...



ĜOJA SCIIGO



La kristana evangelio komenciĝas per kristnasko. Evangelio signifas "ĝoja sciigo", kaj tiu sciigo estis: Dio ne estas kolera dio, sed ama.

Tiu sciigo celas ne nur kristanojn, sed ĝi diras al ĉiu homo, kiu volas aŭskulti: Ne timu pli, ne kedu, ke Dio persekutas vin.

Kristanoj ĝojas pro la naskiĝo de Jesuo, ĉar tio estas la pruvo de Dia amo. Kaj ĉiu povas vidi ke per ĝi komenciĝis nova epoko en la homaro. - Lia instruo: "Amu la proksimulon" ŝanĝis la mondon.

Ne ĉiu skolto estas kristano. Sed ĉiu skolto havas la devon honori Dion. Tion vi ne pli bone povas fari, ol per la obeo al tiu ordono: Amu vian proksimulon kiel vin mem.

KALENDARO DE SKOLTAJ KUNVENOJ.

Ni preparu kalendaron de skoltaj kunvenoj, ke niaj anoj povu prepari vizitojn, prelegojn, ekspoziciojn ktp. La membroj kunlaboru: Sendu informojn kiel eble plej frue al la ĝen. sekr. J.K.Hammer, Taxusstraat 7, Zaandam, Nederlando.

JUBILEO

Skolta Esperantista Ligo, fondita 1918, tiel staras sur la kovrilo.

Kiel celebri la oran jubileon?

Kion donaci al la jubilanto?

1. Per informado kaj laboro inter la geskoltoj en via ĉirkaŭaĵo.

2. Per varbado. Ĉiu esperantisto inter la geskoltoj estu membro kaj abonanto.

3. Ankaŭ neskoltoj povas profiti per "La Skolta Mondo". Abonigu ilin.

4. Subtenu nian ekonomion. Sendu donacon al **KAPITALA FONDUSO** La rentoj de tiu fonduso estas grava enspezo por S.E.L.



Recenzo

M. Halvelik: Universala skribo.
Eldono de la aŭtoro. Havebla ĉe
U.E.A. Prezo 30 steloj.

La aŭtoro asertas, ke tio ne estas scienca libro. Sed ĝi estas en plej valora senco. Kaj ĝi estas treege interesa. I.a. oni en ĝi trovas tekstojn de multaj lingvoj, multaj alfabetoj.

La intenco estas montri, ke la multalfabeteco estas same granda malhelpo en internaciaj rilatoj kiel la multlingveco. Tial li proponas novan, internacian alfabeton kun fonetika skribado. Kaj certe esperantisto ne rajtas pri tio uzi la vorton utopio. Tial: Mi nur pledas: Ne miksu la internacian lingvon kaj niajn penoj pro ĝi, kun tiu nova tasko. Uzu esperanton por la propagando, sed ne intermiksi.

PUGNOMULTFIGILO.

Nia finna repr. informas, ke li ankaŭ povas pari informojn ktp. pri finna invento kaj patento kiu estos grava helpo al malkara multobligado. La prezo de la aparato estas 54 steloj. Kontakto lin se vi deziras informojn.



„ Rigardu la grandan avon, Kiun mi trovis! ”

VETERINFORMILA FLORO



Ĉi tiu floro havas la strangan econ, ke ĝi ŝanĝas koloron kiam pluvo alvenos. Kiel vi vidas per la bildo, mi faris ĝin potfloro.

Eltondu floron el blanka papero, kaj per peniko surmetu fluidaĵon de kobalta klorido kun malmulte da akvo. La solvaĵo do estu forta. La tigon faru el maldika fera fadeno, kaj la foliojn el verda kreppapero.

Alfiksu la sekiĝintan floron al la tigo, kaj metu ĝin en poton - pecon da ronda bastono.

Kiam vi metas la floron en sunbrilon, ĝi bluiĝas, sed ŝanĝas koloron, kiam pluvo alvenos. Ĝi iĝas violkolota, kaj se ĝi iĝos tute ruĝa, certe venos vera pluvplena tago. Bedaŭrinde kobalda klorido ne

estas malkara, sed aĉetante 5 gramojn vi kaj kamarado havas sufiĉe al la tuta familio. Povas esti kristnaskdonaco!

Speideren

TEJO: PASPORTO

La junularorganizo TEJO iniciatis programon "PASPORTO". Per ĝi oni esperas pri pli riĉa persona kontakto inter la divers landaj esperantistoj kiuj vojaĝas. La sistemo:

Se vi deziras gastigi vojaĝantan esperantiston, vi kontaktu TEJOn kaj respondu al ĝia demando. (Adreso: Programo "Pasporto", Bv. Oroño 866 "A", Rosario, Argentino.) Kaj atendu la rezultatojn. Kiam esperantisto intencos veni al via urbo, vi ricevos leteron kun personaj informoj. Oni elektos laŭ la informoj personojn kun plimalpli samaj gustoj, kutimoj ktp. Kaj jen via tasko estos gastigi tiun - kaj sperti la veran utilon de nia lingvo.

Presajaĵo.

Al

Naciaj reprezentantoj:

Aŭstralio: S-ro S.H. Milligan, 274 Mont Albert Rd.,
Surrey Hills, E 10, Victoria.

Brazilo: S-ro Euclides C. Soares, Av. Almirante
Tamandare 979, Belem, Para.

Britujo: S-ro C. Barðsley, 42 Westbourne Street,
Oldham, Lancs.

Danlando: S-ro Sejer Holgersen, Ejnarsv. 99, Lyngby

Finnlando: S-ro Seppo Tella, Pieni Roobertink,
4-6M70, Helsinki 13.

Hispanujo: S-ro Pedro Marqueta, Avenida de Valencia
32, Zaragoza

Italujo: S-ro Pietro Ferrara, Via Brione 10, Torino

Japanujo: S-ro Sinzo Sumiya, Daido Kagaku Sooti K.K.,
16, Suekirotyo Kitatu, Osaka.

Kanado: S-ro John H.F. Hoyle, Box 421, Forest, Ont..
Helpa N.R.: S-ro Paul Ronald, 45, 10th Ave.,
Roxboro, Quebec.

Kongo: S-ro Paul Deloin Nzemba-Paku, Kalembelembe no
225, St. Jean, Kinshasa.

Nederlando: S-ro J.K. Hammer, Taxusstr.7, Zaandam.

Norvegujo: S-ro H.A. Rosbach, Nergt 37c, Kristiansund N

Portugalujo: S-ro J.P. de Melo, Rua Jacinto Nunes
17-3^oDt^o, Lisboa I.

Svedujo: S-ro Curt Bohman, Fack 7, Högen.

Usono: S-ro Larry A. Greene, 1115, Sewanee Drive,
Chattanooga, Tenn., 37412.

